novaj kaj malnovaj elementoj, kiuj kunvivas en harmonio, sen ke unu parto dominu la alian. Bona ekzemplo de tiu kunvivado estas la »Katedralaj promenadoj«: tiel nomiĝas la parto de la montreala subtera urbo, kiu troviĝas tuj sub bela gotika anglikana katedralo, konstruita en la 19-a jarcento kaj daŭre funkcianta. Kial ĝi estas tiom speciala? Ĉar oni konstruis parton de la subtera urbo rekte sub ĝi! Atentemuloj ankaŭ notos, ke la apuda altega ultramoderna konstruaĵo, en kiu respeguliĝas la preĝejo, havas gotik-formajn fenestrojn, kaj ĝia supro similas al mitro (t.a. alta dupinta kapvesto) de episkopo - omaĝe al sia najbara katedralo.

kombinacijo starih in novih elementoj, ki sobivajo v harmoniji, ne da bi ena stran prevladala drugo. Dober primer tega soĝitja je »promenada katedrale«, tako se imenuje del podzemnega mesta Montreal, ki je tik pod lepo gotsko anglikansko katedralo, zgrajeno v 19. stoloĉtju, ki od takrat neprekinjeno deluje. Zakaj je tako posebna? Ker so zgradili del podzemnega mesta neposredno pod njo! Pozorni opazovalci tudi ugotovijo, da ima sosednja ogromna ultramoderna stavba, v kateri odseva cerkev, gotsko oblikovana okna, in vrh zgradbe je podoben mitri (to je visokemu ŝkofovskemu pokrivalu z dvema konicama) v ĉast sosednji katedrali.

La Reĝa Monto

La lastan tagon ni invitis niajn gastojn al la Reĝa Monto: Mont Royal, kiu donis sian nomon al la urbo. Laŭ unu rakonto, kiam Jacques Cartier, franca esploristo de la 16-a jarcento, alvenis al la supro de la monto kaj de ĝi rigardis al la riverego, li diris, ke la vido de la monto estas vere reĝa. Mi ne scias ĉu tio veras aŭ ne, sed mi atestas, ke la vido de la monto ja estas reĝa : la blanka neĝa trankvilo de la vintro estas same bela kiel la verda abundo de la somero. 233 metrojn alta, la Reĝa Monto estas grandega parko tute meze de la urbo kaj estas ŝatata de montrealanoj en ĉiu sezono: somere por promeni, pikniki kaj bicikli, kaj vintre por skii, sketi, neĝoŝui aŭ simple promeni — kaj foti sciurojn en ĉiu sezono (ankaŭ Clay ne povis rezisti tiun tenton)! Ĉar Montrealo estas insulo, sciuroj abundas en nia urbo (ili ja ne povas naĝi por eliri de la insulo !), kaj ili aparte multas sur la Reĝa Monto, je granda amuziĝo de turistoj kaj novaj enmigrintoj.

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

Kraljevi hrib

Naŝe gaste vabimo tudi na kraljevi hrib Mont Royal, ki je dal ime mestu. Po pripovedovanju je Jacques Cartier, francoski raziskovalec iz 16. stolecia, priŝel na vrh hriba in gledal veliko reko in dejal, da je pogled z gore resniĉno kraljevski. Ne vem, ali je to res ali ne, ampak potrijjem, da je pogled z gore res kraljevski: beli sneĝni mir zime je tako lep kakor zeleno obilje poletja. Visok 233 metrov, je kraljevski hrib ogroman park v mestu, priljubljen pri prebivalcih Montreala v vsakem letnem ĉasu: poleti za sprehod, piknik in voĝnjo s kolesom, pozimi za smuĉanje, drsanje ali pa preprost sprehod - in fotografiranje veveric v vseh letnih ĉasih Ker je Montreal otok, je veliko veveric v naŝem mestu (ne morejo odplavati z otoka!), zlasti veliko jih je kraljevem hribu, v veliko zabavo turistov in novih priselencev.

*Evgenija (Ĵenja) Amis
Prevedel Milan Jarnoviĉ*



Montreal - La reĝa monto | Kraljevi hrib

Yevgeniya (Ĵenja) Amis naskiĝis en Kievo (Ukrainio).

De 2005 tra septembro 2010 ŝi vivis en Atlanta, Georgia. Ŝi nuntempe loĝas en Montrealo, Kanado. Ŝi diplomiĝis kiel ĵurnalisto kaj redaktoro (rusa kaj ukraina) en Nacia teknika universitato de Ukrainio, Presista kaj eldonista departemento.

En Ukrainio, ŝi laboris kiel ĵurnalisto kun kelkaj gazetoj kaj revuoj, ŝi skribis plejparte pri turismo. De 2002 ĝis somero 2007, ŝi estis la redaktoro de Kontakto, - soci-kultura revuo de UEA / TEJO; ŝi estis kunredaktoro de TEJO Tutmonda (2004-2006) kaj Esperanto USA (2005-2007). En 2006-2010, ŝi laboris kun la Amerika ruĝa kruco kiel kontrolisto de datenbazo kaj rekta poŝto kaj kiel merkata analizisto.

Yevgeniya estas rozkrucano; ŝi amas redaktado, tradukado kaj lingvoj; Yevgeniya amas ĉiujn bestojn, precipe hundojn, kaj irado en naturon.



Evgenija (Ĵenja) Amis je bil rojena v Kijevu (Ukrajina).

Od 2005 leta do septembra 2010 je živila v Atlanti, Georgia. Sedaj živi v Montrealu v Kanadi. Diplomirala je kot novinarka in urednica (rusko in ukrajinsko) na Narodni tehniĉni univerzi v Ukraini, Tiskarski in zaloĝniŝki oddelek.

V Ukraini, je delala kot novinarka z veĉ ĉasopisi in revijami, najveĉ je pisala o turizmu. Od 2002 leta do poletja 2007 je bila urednica Kontakto, socialnokulturne revije UEA / TEJO; je bila sorednica TEJO Tutmonda (2004-2006) in Esperanto USA (2005-2007). V obdobju 2006-

2010 je delala na ameriŝkem Rdeĉem kriĝu kot nadzornica podatkovne baze in direktne poŝte ter kot trĝni analitik.

Yevgeniya je Roĝnokriĝarka; ljubi urejanie, prevajanie in jezike; Yevgeniya ljubi vse živali, predvsem pse in sprehode v naravi.

Pogled na emigracijske tokove skozi Zamenhofove naočnike...

Rigardo al la migrantaj fluoj tra la okulvitro de Zamenhof...

Ĉu d-ro Zamenhof fariĝis oftalmologo, do okulkuracisto, ĉar li jam ekde sia junaĝo havis malbonan vidon, ne estas konate, sed estas konate, ke li malbone toleris rigardon sur la sangon kaj tiel li nur malfacile povus praktiki la ĝeneralan kuracistan servon, kiu en lia tempo estis multe pli ligita kun la sango ol tio okazas niatepe. Ĉiukaze liaj rondaj okulvitroj estas la parto de lia karakteriza imago de bonkora kaj aminda homo, la tipo, kia en nia tempo ĉiam pli fariĝas raraĵo.

La parolanto de la internacia lingvo de Zamenhof ĝuste en tiuj ĉi tagoj, kiam la eŭropa politiko ne scias, kio koncerne Eŭropon okazas, kaj ĝi el la antaŭvidita konstruĝeniera skipo jam delonge fariĝis iaspeca konfuza fajrobrigado, kiu kuras de iu scenejo al la alia, provante estingi fajron, multfoje per fluaĵo, kiu mem facile brulas, multfoje ankaŭ per akvo, kiam temas pri la fajro, kaŭzita per la rektkonekto en la elektra kondukilaro, estas sub defio sin demandi, ĉu la spirito de la lingvo, por kiu li decidiĝis el la humanecaj motivoj, povas la demandon pri la aŭtentaj aŭ eble ankaŭ ŝajnaj rifuĝintoj, prilumi kaj klarigi pli bone, kiel tion povas fari la tag-taga politiko kaj la gazetaro kaj la televidaj kaj radiaj raportoj. Ke Zamenhof, kiu jam tuj dekomence rezignis pri ĉiuj aŭtoraj kaj aŭtoritataj rajtoj aŭ privilegioj koncerne la lingvon, kiun li donacis al la homaro, por la uzantoj de lia lingvo tamen ĝis nun estas la plej forta aŭtoritato ne nur kaze de la lingvaj, sed ankaŭ de la moralaj demandoj, koncernantaj la kunvivadon inter la homoj kaj popoloj, estas ekster debato. Kio do estus pli natura ol ke la parolanto de la internacia lingvo ankaŭ ĉi tie simile, kiel en similaj kazoj procedas kristano, kiu ŝparas multan nebezonatan teorion klopodon, kiam li simple sin demandas: Kiamaniere en tiu ĉi kazo parolus kaj procedus Kristo? La esperantisto apud sia konsultiĝo kun sia savanto, se temas pri kristano, demandus sin ankaŭ: Kiamaniere en tiu ĉi kazo parolus kaj procedus Zamenhof?

Ĉi tie endas mencii ankoraŭ unu similecon inter ambaŭ identokampoj. Kiel la kristano, ankaŭ la esperantisto, krom en minora amplekso kun la anarkiistoj de Lanti, kiuj intertempe jam pliparte estas la forgesita parto de la esperanta historio, estas legitimisto, kiu estimas la ŝtatan ordon kaj la aŭtoritaton, eĉ se tiu al li ne estas amika, kiel ankaŭ la cara aŭtoritato de Rusio ne estis amika al la esperantistoj kaj jam je la komenco (1895) la unua esperanta gazeto *La esperantisto*, aperinta en Nurenbergo (Nürnberg), havante la plimulton da siaj abonantoj en Rusio, ĉar en ĝi aperis traduko de la eseo de Tolstoj *Prudento kaj kredo*, estis en Rusio malpermesita. La religia batalo inter la imperia ortodoksio kun ĉiuj grandaj sacerdotaj kaj eklaziaj privilegioj kaj riĉaĵoj, kaj la kompreno de la evangelio laŭ Tolstoj, okazis tuj je la komenco de la esperanta historio.

La unua generacio de la esperantistaro en la rusa carlando, kiel tion bone montris dum iu sia prelego d-ro Giorgio Silfer, estis unuflanke la judaj rabenoj kaj aliaj pli

Pogled na emigracijske tokove skozi Zamenhofove naočnike...

Ali je dr. Zamenhof postal oftalmolog, torej oĉesni zdravnik, ker je imel že od mladosti slab vid, ni znano, znano pa je, da je slabo prenaŝal pogled na kri in bi tako teĝko opravljaj sploŝno zdravniŝko prakso, ki je v tistem ĉasu imela veliko veĉ opraviti s krvjo, kakor je to danes. Vsekakor pa so njeĝovi okrogli naoĉniki del njeĝove znaĉilne podobe dobrotnega in ljubezniveĝa ĉloveka, tipus, ki v naŝem ĉasu postaja vse bolj redek.

Govorec Zamenhofoveĝa mednarodnega jezika pa je prav v teh dneĝ, ko evropska politika ne ve, kaj se z Evropo dogaja in je iz zamiŝljenega gradbenega inĝeniringa že davno postala nekoliko zmedena gasilska brigada, ki teka od prizoriŝĉa do prizoriŝĉa in skuŝa gasiti, velikokrat s tekoĉino, ki je sama vnetljiva, velikokrat tudi z vodo, ko gre za ogenj, povzroĉen s kratkim stikom v elektriĉni napeljavi, izzvan, da se vpraŝa, ali mu duĝ jezika, za katereĝa se je odloĉil iz ĉlovekoljubnih pobud, lahko vpraŝanje resniĉnih in morda tudi laŝnih beguncev, osvetli in razjasni bolje, kakor to more dnevna politika in dnevni tisk ali dnevna televizijska in radijska poroĉila. Da je Zamenhof, ki se je sicer na samem zaĉetku odrekel vsem avtorskim in avtoritarnim pravicaĝ ali privileĝijem glede jezika, ki ga je poklonil ĉloveŝtvo, za uporabnike njeĝoveĝa jezika kljub temu vse do danes najmoĉnejŝa avtoriteta ne samo v jezikovnih, ampak tudi moralnih vpraŝanjih, ki zdevajo soŝitje med ljudmi in narodi, je nesporno. Kaj je torej bolj naravnega, kakor da govorec mednarodnega jezika tudi tu ravna podobno, kakor ob podobnih reĉeh ravna kristjan, ki si prihrani veliko nepotrebneĝa teoretiĉnega truda, ko se preprosto vpraŝa: Kako bi ob teĝ zadevi govoril in ravnal Kristus? Esperantist pa se poleg konzultacije z odreŝenikom, ĉe gre za kristjana, vpraŝa tudi: Kako bi ob teĝ zadevi govoril in ravnal Zamenhof?

Ob tem je treba omeniti ŝe eno podobnost med obema identitetaĝ. Kakor kristjan, je tudi esperantist, razen v manjŝinskem primeru Lantijevih anarhistov, ki pa so medtem že v glavnem pozabljeni del esperantske zĝodovine, legitimist, ki spoŝtuje drŝavni red in oblast, tudi ĉe mu ta sama ni naklonjena, kakor tudi ruska carska oblast ni bila naklonjena esperantistom in je že na samem zaĉetku (1895) prepovedala priĝajanje prveĝa esperantskeĝa ĉasopisa *La Esperantisto*, ki je izĝajal v Nurenberĝu, najveĉ naroĉnikov pa je imel v Rusiji, ker je v njeĝ izŝel prevod Tolstojeveĝa spisa *Prudento kaj kredo* (Pamet in vera). Verski boj med drŝavnim imperatorskim pravoslavjeĝ z vsemi velikimi duhovniŝkimi in cerkvenimi privileĝiji in bogastvi, in tolstojanskim razumevanjeĝ evangelija, je bilo prisotno na samem zaĉetku esperantske zĝodovine.

Prva generacija esperantistov v ruskem carstvu, kakor je to dobro prikazal v nekem svojem predavanju dr. Giorgio Silfer, pa so bili na eni strani judovski rabini in

kleraj judoj en Ruslando, aliflanke la adeptoj de Tolstoj, do tiuj, kiuj volis vivi laŭ la evangelio de Kristo.

Sen tiuj du grupoj de la unuaj esperantistoj tiu ĉi lingvo formortus jam kelkajn jarojn post la estiĝo. La judoj pli forte rememoris la raporton pri la kreado (1 Mos), kiu ankaŭ montras, kiamaniere Dio donis al la homo la lingvon, kaj kiel Li invitis al la kunformado de la lingvo jam Adamon, kio faras la bazon por kompreni la principon de Esperanto; la tolstoĵanoj estis pli interesitaj pri la principo, laŭ kiu okazis la pentekosta miraklo en Jerusalemo (Ago 2) kaj pri la ordo de Kristo, kiun poste esprimis ankaŭ Paŭlo, ke oni portu la ŝarĝojn unu al la alia (Mat 7,12; Gal 6,2), sekve ankaŭ la ŝarĝon de la plurlingveco, kiun ĝuste la komuna lingvo kiel la dua lingvo por ĉiu homo helpas porti plej juste kaj efike. Zamenhof neniam ribelis kontraŭ la aŭtoritatoj, li respektis la leĝojn kaj iu ajn subfosado de la ŝtata kaj jura ordo estis al li fremda, kvankam la imperio, kies subulo li estis, nome la rusa, tiun ĉi lojalecon nek observis nek kompensis. Agnoskojn por sia granda verko li ricevis de la regnestroj de la eŭropa Okcidento, antaŭ ĉio de Anglio, kio faras paradokson, kiun kelkaj niaj klopodantoj (mi evitas la klasikan esperantan nocion »samideanoj«, ja ni havas komunecon en la lingvo kaj en la principa filantropio, sed en ĉio alia ni havas diversan pensadon kaj kredon) ne povas kompreni, ja ili estas kaptitoj de la ideologia antaŭjuĝo, laŭ kiu la angla lingvo estas la plej granda malhelpo kaj kontraŭeco de la internacia lingvo.

Zamenhof siajn rigardojn sur la kunvivado de la nacioj kaj iliaj unuopaj nacioj en la politika senco plej klare esprimis en sia *Alvoko al la diplomatoj* en la jaro 1915, do meze de la unua mondmilito, publikigita en la angla gazeto *The Esperantist* en Esperanto kaj en la angla traduko. Jam en la enkonduka parto li diris viziajn vortojn, kiuj ankaŭ malĝoje plenumiĝis:

„Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj.”

Zamenhof estis homo de la plej vastaj kaj profundpenetraj rigardoj. Li antaŭvidis estiĝon de la Unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo, li antaŭvidis la tuteŭropan altan kortumon, tamen ĉion en alia senco ol tio efektivigis nuntempe, nome en la ŝlosilo de la justeco kaj interkonsento surbaze de la egalrajto. Tiel li diras en tiu apelacio inter alio:

„Oni scias ja tre bone, ke la vortoj ‚patrujo en danĝero‘ ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: ‚Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun mia gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata.’”

aliflanke la adeptoj de Tolstoj, do tiuj, kiuj volis vivi laŭ la evangelio de Kristo.

drugi bolj izobraženi Judje v Rusiji, na drugi pa tolstoĵanci, se pravi tisti, ki so hoteli živeti po Kristusovem evangeliju. Brez teh dveh skupin prvih esperantistov bi ta jezik zamrl že nekaj let po svojem nastanku. Judje so se bolj spominjali poročila o stvarjenju, ki prikazuje tudi, kako je Bog dal človeku jezik, čemu mu ga je dal, in kako je k sooblikovanju jezika povabil že Adama, kar je osnova za razumevanje esperantskega principa; tolstoĵanci pa so bili bolj pozorni na načelo, po katerem se je dogajal binškošni ĉudež v Jeruzalemu, in na Kristusovo naročilo, ki ga potem izrazi tudi Pavel, naj drug drugemu nosimo bremena, torej tudi breme večjezičnosti, ki ga prav skupni jezik kot drugi jezik vsakega človeka pomaga nositi najbolj pravično in učinkovito. Zamenhof se nikoli ni upiral oblastem, spoštoval je zakone in mu je bilo vsako spodnašanje državnega in pravnega reda tuje, čeprav mu carstvo, katerega podanik je bil, namreč rusko, te lojalnosti ni niti upoštevalo niti vračalo. Priznanja za svoje veliko delo je dobil pri vladarjih evropskega zahoda, predvsem v Angliji, kar je paradoks, ki ga nekateri naši sotrudniki (izogibam se klasičnemu esperantskemu izrazu »samideanoj« - somišljeniki, saj imamo skupnost v jeziku in načelni človekoljubnosti, v vsem drugem pa smo povsem različnega mišljenja in verovanja) ne morejo razumeti, saj so ujeti v napačen in Zamenhofu nasprotujoč ideološki predsodek, da je angleščina največja ovira in nasprotnica mednarodnega jezika.

Zamenhof je svoje poglede na sožitje narodov in njihovih posameznih pripadnikov v političnem smislu najbolj jasno izrazil v svojem *La alvoko al la diplomatoj* (Klic diplomatom) leta 1915, torej sredi prve svetovne vojne, objavljen v angleškem časopisu *The Esperantist* v esperantu in angleškem prevodu. Že v uvodnem delu je povedal vizionarske besede, ki so se tudi žalostno izpolnile:

„Ko se boste sestali po najbolj morilski vojni, ki jo je kdaj poznala zgodovina, boste imeli pred seboj izredno veliko in pomembno nalogo. Od vas bo odvisno, ali naj ima svet odslej trden mir za zelo dolgo časa in morda za vedno, ali pa naj bi imeli le začasno utišanje, ki ga bi kmalu prekinile razne eksplozije mednarodnih bojev ali celo novih vojn.”

Zamenhof je bil človek najširših in prodornih pogledov. Predvidel je nastajanje Združenih držav Evrope, predvideval je evropsko višje sodišče, vse pa v drugačnem ključu, kakor se to dogaja danes, namreč v ključu pravičnosti in sporazumnosti na podlagi enakopravnosti. Tako pravi v tem apelu med drugim:

„Zelo dobro vendar vemo, da besede, ‚domovina v nevarnosti‘ ne pomenijo, da kdo hoče iztrgati del naše domovine in ga vreči v morje, ali da si kdo hoče prisvojiti imetje njenih prebivalcev, pač pa najbolj običajno te besede preprosto pomenijo: ‚Grozi nevarnost, da bo na kosu zemlje, kjer je doslej moj narod bil gospodar in so bili drugi ljudje le bolj ali manj tolerirani, mogoče jutri kak drug narod postal gospodar in moj narod samo toleriran.’”

El tiu politika kaj morala dokumento oni ne povas senpere dedukti la solvon, kiun Zamenhof estus proponinta por tio, kio en Eŭropo okazas en nia tempo, ja li tie parolis pri la postmilita justa aranĝo de Eŭropo. Sed ĉiukaze oni el liaj principoj povas konkludi ankaŭ pri tio, kiamaniere li estus ilin utiliginta en tia kazo, kia nun troviĝas antaŭ ni.

Ĉiukaze Zamenhof ankaŭ en la kazo de amasa transmigrado de pliparte islama loĝantaro en Eŭropon sen respekto al la ŝtataj limoj, al la ŝtataj aŭtoritatoj kaj al la indiĝena loĝantaro unue estus uzinta sian unuan principon, ke la anoj de iu ajn etna, lingva, religia kaj civita grupo unuarange estas homoj kaj tiel indaj de estimo kaj prijuĝo nur laŭ ilia konduto kaj agado kaj ne laŭ ilia aparteno aŭ deveno. Ne, de kie ili venas, sed, kiel ili kondutas kaj agas. Zamenhof ne estus havinta timon, ke tiuj alvenintoj povus ŝanĝi la religian, kulturalan kaj eble ankaŭ lingvan bildon de Eŭropo, ja li tro bone sciis, ke preskaŭ neniuj el la etnoj, kiuj nuntempe vivas en Eŭropo havas eŭropan originon, sed la mezopotaman, ke do ankaŭ la nunaj germanoj, francoj, svedoj, sed ankaŭ ĉiuj slavaj nacioj, kiel ĉiuj aliaj, devenas el la regiono inter la durivero de Eŭfrato kaj Tigriso, kie laŭ la raporto pri la kreado estis farita la unua homa paro. Ankaŭ la nacioj el la antaŭa, ankoraŭ unueca homaro, devenis el Babilono, pri kio raportas la 11-a ĉapitro de Genezo. Kaj li ankaŭ sciis, ke neniuj, estante eĉ tiom violenca, de la homo aŭ de la nacio povas forpreni tion, kiamaniere oni sentas, kredas, pensas kaj kiel oni tion diras aŭ skribas, se tiuj unuopaj personoj kaj la tuta nacio mem ne estas pretaj tion forgesi aŭ demeti pro la utiloj, kiujn ili per tio esperas atingi. Tiel ankaŭ Eŭropo ne povas esti islamigita fare de la islamanoj, tion povas fari nur eŭropanoj mem, kaj en la kreskanta mezuro ili tion jam faras. Al slovenoj neniuj niatempe malpermesas uzi ilian lingvon, sed ĝuste en siaj plej altaj edukaj kaj sciencaj institucioj, kiuj devus esti ankaŭ la plej kvalifikitaj gardantoj de la slovena lingvo kaj kulturo, iom post iom la slovena lingvo estas forpuŝata profite je la malplialta nivelo de la kvazaŭ internacia angla lingvo. Zamenhof, se oni havus intencon lin aŭskulti, sed jam lia *Alvoko al la diplomatoj* de neniuj estis prenita serioze, kvankam li en sia antaŭvideco kaj profundo granddistance superis tion, kion la diplomatoj de tiu tempo havis en siaj pensoj kaj koroj, estus proponinta tiujn homojn, kiel ajn ili venis en niajn lokojn, akcepti tiel, kiel li mem en sia domo akceptis ĉiun pacienton, kiu venis al li por ricevi kuracitan terapion, eĉ ne havante monon por pagi la intervenon, kaj li al miloj da tiaj faris sian medicinan servon senpage, kaj kiel li akceptis ĉiun parolanton de la internacia lingvo, kiun li donacis al la homaro, senrigarde, kun kia penso kaj kredo tiu frapis sur lia gastama pordo. Esperanto ne komenciĝas per vortaro kaj gramatiko, sed per tio, kion diras la samgentano de Zamenhof, la apostolo Paŭlo: „*Ne forgesu gastamon al nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn, ne sciante*” (Heb 13,2).

La argumento, ke tiuj, kiuj alvenas al ni tiel, kiel ili ĵus venas, nome kontraŭleĝe, foje eĉ perforte, evidente ankaŭ ne ĉiuj en vera plago, ne povas esti anĝeloj, nome metafore, ne trafas en la mezon, ja la apostolo la gastamon ne kondiĉigas per la anĝela moralo de la

Iz tega političnega in moralnega dokumenta ni mogoče neposredno izpeljati reŝitve, ki bi jo Zamenhof predlagal za to, kar se v Evropi dogaja v naŝem ĉasu, saj je tu govoril o povojni praviĉni ureditvi Evrope. Vsekakor pa se iz njegovih naĉel da sklepati tudi na to, kako bi jih uporabil v takem primeru, kakor je zdaj pred nami.

Vsekakor bi Zamenhof tudi v primeru mnoĝiĉnega preseljevanja preteĝno muslimanskega prebivalstva v Evropo brez spoŝtovanja drĝavnih meja, organov oblasti in domaĉega prebivalstva najprej uprabil svoje prvo naĉelo, da so pripadniki katere koli etniĉne, jezиковne, verske in drĝavljanske skupine najprej ljudje in tako vredni enakega spoŝtovanja in presojanja zĝolj po svojem vedenju in ravnanju, ne pa po pripadnosti in izvoru. Ne od kod prihajajo, ampak, kako se vedejo in kaj delajo. Zamenhof ne bi imel strahu, da bi ti priŝleki spremenili versko, kulturno in mogoĉe tudi jezиковno podobo Evrope, saj je predobro vedel, da skoraj nobeden od narodov, ki danes ĝivijo v Evropi, ni evropskega, ampak mezopotamskega izvora, da torej tudi danaŝnji Nemci, Francozi, Ŝvedi, a tudi vsi slovanski narodi, kakor vsi drugi, prihajajo iz dvoreĉja Evfrata in Tigrisa, kjer je po poroĉilu o stvarjenju bil narejen prvi ĉloveŝki par. Tudi narodi so iz preĝŝnjega ŝe enotnega ĉloveŝtva izŝli iz Babilona, o ĉemer poroĉa 11. poglavje 1. Mojzesove knjige. In vedel je tudi, da nihĉe, naj bo ŝe tako nasilen, ĉloveku in narodu ne more odzvati tega, kako ĉuti, veruje, misli in kako to pove ali zapiŝe, ĉe ti posamezniki in ves narod niso sami pripravljeno to pozabiti ali odloĝiti zaradi koristi, ki si jih od tega obetajo. Tako tudi Evrope ne morejo islamizirati muslimani, to lahko storijo le Evropejci sami, in v vedno veĉji meri to ĝe delajo. Slovencem danes nihĉe ne brani njihovega jezika, a ga prav v svojih najviŝjnih izobraĝevalnih in znanstvanih ustanovah, ki bi morale biti tudi najbolj usposobljeni varuhi slovenskega jezika in kulture, poĉasi, a vse bolj vidno odlagajo v prid niĝjemu standardu nekakŝne mednarodne angleŝĉine. Zamenhof, ĉe bi ga hotel kdo posluŝati, a ĝe njegovega *Apela diplomatom* nihĉe ni jemaĉ resno, ĉeprav je v svoji daljnovidnosti in globini daleĉ presegal to, kar so diplomati tiŝtega ĉasa imeli v misliĝin srciĝin, bi predlagal, naj te ljudi, kakor koli so ĝe priŝli v naŝe kraje, sprejmemo tako, kakor je sam v svoji hiŝi sprejel vsakega pacienta, ki je priŝel k njemu na zdravljenje, tudi ĉe ni imel denarja, da bi plaĉal njegov zdravniŝki poseg, in ga je na tisoĉih opravil brezplaĉno, in kakor je sprejel vsakega govorca mednarodnega jezika, ki ga je podaril ĉloveŝtvu, ne glede na to, od kod, s kakŝnim miŝljenjem in vero, je ta potrkal na njegova gostoljubna vrata. Esperanto se namreĉ ne zaĉenja v slovarju in slovnici, ampak v tem, kar pravi Zamenhofov rojak apostol Pavel: „*Ne pozabite na gostoljubnost. Ker so bili nekateri gostoljubni, so namreĉ pogostili anĝele, ne da bi se zavedali*” (Heb 13,2).

Argument, da ti, ki prihajajo k nam tako, kakor prihajajo, namreĉ ilegalno, vĉasih tudi nasilno, oĉitno tudi ne vsi v stiski, nikakor ne morejo biti anĝeli, nameĉ prispodobno, ne zadane v ĉrno, saj apostol gostoljubnosti ne pogojuje z anĝelsko moralo gostov, ampak jo samo ŝe dodatno

gastoj, sed ĝin nur aldone prilumas, ja antaŭ Dio la gastamo restas la sama virto senrigarde, ĉu oni la gaston povus kompari kun anĝeloj aŭ pli verŝajne kun demonoj, kiel ankaŭ la bonkoreco estas antaŭ Dio la sama virto, ĉu la ricevanto la helpon vere bezonas aŭ li trompas. Zamenhof ankaŭ koncerne religion pledus por la starpunkto, ke ne estas malbono kaj perdo, se iu pro sia oportuneco aŭ timo alprenas alian kredon, en tiu ĉi kazo la islaman, ja tio signifas, ke li ankaŭ en la antaŭa, ĉu katolika aŭ kristana, al kiuj formale apartenas la plimulto da eŭropanoj, ne estis aŭtentaj kaj do temis nur pri la interŝanĝo enkadre de la sama oportunisma sinteno kaj ne pri la alpreno de nova kredo, ja ĝi nek troviĝis antaŭe nek ĝi troviĝas nun. Se la religia oportunisto sin lasas cirkumcidi, tio la realan religian bildon de Eŭropo tute ne ŝanĝas. Sed kiu demetus sian antaŭan kredon kaj akceptus la islaman el sia profunda konvinko kaj sincero, tiun oni devus estimi, ke li agis laŭ sia konscienco, ja nia kontraŭstaro al tia ŝanĝo nin egaligus kun tiuj, pro kiuj kelkaj timas islamon, ĉar iliaj juĝistoj la forlason de propra kredo punas per mortigo aŭ almenaŭ per fortaj reprezalioj.

Kiel la aŭtenta kristano estus akceptinta la alveninton el la islama medio kun pano kaj akvo en unu mano kaj kun la evangelio en la alia, kio estis ankaŭ la intenco de Trubero, tiel ankaŭ la aŭtenta esperantisto estus akceptinta la kredanton laŭ Mahometo kun pano kaj akvo en unu mano kaj kun la lernolibro de Esperanto en la alia. Tiel li ne montrus al li nur, ke la bona Esperanto estas multe pli bona ol la malbona angla – kaj la nedenskulo povas reale lerni bonan Esperanton, dum la bonan anglan regule li ne povas lerni – sed li ankaŭ montrus, ke li ne havas intencon lin asimili, forpreni de li tion, kio konsistigas lian konscion, kredon kaj kulturon, sed volas kun li interparoli sur la oazo de la lingva egalrajto kaj funkcio, kian Esperanto ĉiukaze donas.

Sed Zamenhof tiujn, kiuj alvenas en la ŝtaton tiamaniere, kiel iu venas en privatan domon sen sin anonci, sen sonorigi, sen frapi, sen sin prezenti poste, kion oni regule nomas enrompo, ne estus konfirmanta, ja li troviĝis flanke de la leĝo kaj ne de la arbitro kaj anarkio. Se do li tian homon estus akceptinta kaj proponinta al li, kion tiu bezonas por sia korpo kaj kion li povus utiligi por egalrajta interkompreniĝo kaj por akcepti la juran kaj moralan koncepton, kian la esperanta ideo enhavas, li ĝuste en la spirito de tiu „interna ideo” ankaŭ malferme estus dirinta, ke honesta kaj bonintenca homo tiamaniere ne enpaŝas, nek en domon nek en ŝtaton. Zamenhof, kiu per sia spirita formo estis liberala judo, kvankam ne liberala en la moderna pervertita signifo de tiu ĉi vorto, ja la latina vorto *liberalis* signifas donema, kion la nuntempa liberalismo ne plu scias, eĉ tre bone sciis, ke la vera bonkoreco kaj la fidelo al la vero kaj al la justeco ne troviĝas en kontraŭdiro, sed ili inter si komplementiĝas kaj sin reciproke kondiĉigas!

Vinko Oŝlak

osvetljuje, saj je pred Bogom gostoljubnost enaka vrlina ne glede na to, ali bi mogli gosta primerjati z angeli ali pa nasprotno z demoni, kakor je tudi dobredelnost pred njim enaka vrlina, ali je prejemnik pomoči res potreben ali pa goljufa. Zamenhof bi tudi glede vere zagovarjal stališče, da ni nobena nesreča in izguba, če kdo iz oportunitizma ali strahu sprejme drugo vero, v tem primeru islam, saj to pomeni, da tudi v prejšnji, bodisi katoliški ali krščanski, katerima formalno pripada večina Evropejcev, niso bili pristni in je torej šlo le za zamenjavo iste oportunistične drže, ne pa za zamenjavo vere, ki je sploh ni bilo prej in je ni zdaj. Če se verski oportunista da obrezati, to resnične verske slike Evrope niti malo ne spremeni. Kdor pa bi odložil svojo prejšnjo vero in sprejel islam iz globokega prepričanja in iskrenosti, tega je treba spoštovati, da je ravnal po svoji vesti, saj nas bi nasprotovanje taki zamenjavi izenačilo s tistimi, zaradi katerih se nekateri islama bojijo, ko muslimanski sodniki zamenjavo vere kaznujejo s smrtjo ali vsaj s hudimi represalijami.

Kakor bi resnični kristjan sprejel priŝleka iz islamskega okolja s kruhom in vodo v eni roki ter z evangelijem v drugi, kar je bil tudi Trubarjev namen, bi tako tudi resnični esperantist sprejel Mohamedovega vernika s kruhom in vodo v eni in z učbenikom esperanta v drugi roki. S tem bi mu ne pokazal le, da je dober esperanto veliko boljši kakor slaba angleščina – in neanglež se realno lahko nauči dobrega esperanta, medtem ko se dobre angleščine po redni poti ne more naučiti – ampak bi mu tako tudi pokazal, da ga ne želi asimilirati, mu odvzeti to, kar sestavlja njegovo zavest, njegovo vero in njegovo kulturo, ampak se želi z njim pogovarjati na oazi jezikovne enakopravnosti in funkcionalnosti, kakršno esperanto vsekakor daje.

Zamenhof pa tistih, ki prihajajo v državo tako, kakor pride kdo v zasebno hišo, ne da bi se najavil, ne da bi pozvonil ali potrkal in ne da bi se vsaj potem predstavil, čemur se pravilno reče vlom, ne bi potrdil, saj je bil na strani zakona in ne samovolje in anarhije. Ko bi torej takega človeka sprejel in mu ponudil, kar potrebuje za telo in kar bi mu pomagalo pri enakopravnem sporazumevanju in pri privzetju pravnega in moralnega čuta, ki ga esperantska zamisel vsebuje, bi mu prav v duhu te „notranje ideje” tudi odkrito povedal, da pošten in dobrohoteč človek tako ne vstopi ne v hišo in ne v državo. Zamenhof, ki je bil po svoji duhovni formaciji jud, četudi liberalen jud, a ne liberalen v današnjem pervertiranem pomenu te besede, saj latinska beseda *liberalis* pomeni radodaren, cesar današnji liberalizem ne ve več, je še kako dobro vedel, da resnična dobrota in zvestoba resnici in pravičnosti niso v nasprotju, ampak se dopolnjujejo in medsebojno pogojujejo!

Vinko Oŝlak

V prejšnji številki našega glasila (junij 2015 - najdete na tej povezavi: <http://esperanto-maribor.si/glasilo-bulteno/>)

smo vam predstavili življenje in delo Alme M. Karlin. Tokrat objavljamo kratko zgodbo te avtorice.

Alma M. Karlin
La anonco

Mia patro kaj mia patrino ambaŭ estis maljunaj. Ili geedziĝis nekutime malfrue kaj esperis la reston de siaj tagoj travivi en agrabla kontemplo. Ili aĉetis domon ĉe la labaka akcizejo, kie en la mezepoko staris la urba pordego kaj kie en la romia erao la eliro de Arx etendiĝis – tiutempe Celeo ankoraŭ estis Claudia Celeja kaj nomita la dua Trojo. Kiam mia patro foje esploris pli precize truon en la kelo, li trovis en la grundo malprofunde enfosita tomoŝtonon de iu romia soldato kaj li masonis ĝin super la kelo. La spirito de tiu romiano devus fantomi ĝis niaj tagoj...

Neniu pensis pri la infanoj, ja mia patrino jam proksimiĝis al siaj kvindek jaroj. Ŝi, por esti plene sendependa, sian instruistan profesion ne forlasis, kiam ŝi edziniĝis al la maljuna kaj malsaneta oficiro. La potagaj ekskurzoj kun ĝoja etoso, kvietaj somerferioj, mallongaj vojaĝoj al tiu aŭ alia grandurbo faris la tlorison de la tuta kompleto de aspiroj kaj planadoj. Kiel du boatoj en la vesperkrepusko apenaŭ rimarkeblaj, forcitaj al la loko de ankriĝo, miaj gepatroj esperis atingi la vesperon de sia ekzisto sur la trankvilaj akvoj, kaj la pro tiu ĉi geedziĝo unue amare ekscititaj etosoj de la proksimaj apartenantoj iom post iom trankviliĝis. Ĉe la malnova labaka pordego simple troviĝis unu tre altaĝiĝinta geedza paro plu, kiun priservis samtiel maljuna kuiristino, transprenita kune kun la domo kaj farmeto, eĉ kun la praaĝa verda papago, kiu »Herr Major! Herr Major!« (Sinjoro majoro) eldiraĉis ĉiam, kiam la eskala pordo malfermiĝis.

Unu belan tagon – mia patro mole glitis en sian sesdekan vivojaron – mia patrino diris, havante admirindan staturon (la tiel nomatan vesptalion) kaj la sintenon de reĝino:

»Bedaŭrinde eraro estas ekskluzivita! Mi kadukas kiel feĉpastro; mia tuta aspekto estas degenerita. Certe mi havas en mia ventro ia ajn absceson.«

»Tio foje estas tiel, dum la klimaktero,« opiniis mia patro kun sia beata necerteco.

Ili elprovis la ĝenan fremdkreskaĵon forigi per vinagraj kompresoj kaj multaj pulvoroj laŭ Seidlitz, sed kiam anstataŭ malapero oni povis observi daŭran kreskon,

mia patrino veturis al la konata porvirina kuracisto d-ro Valenta al Labako, ŝi lasis sin precize esplori kaj finfine ĝeme demandis:

»Kiam do jam devas esti forigita – la polipo?«

»Ne estas bezono!« respondis la altaĝa ginekologo ridetante, »ĝi elvenos post kvar monatoj mem kaj volos manĝi kaj trinki...«

Mi kredas, ke tiu respondo kondukis al sveniĝo. Kun certeco mi tion ne scias, kvankam mi ja certgrade ĉeestis. Ĉiukaze tio estis fulmo el la serena ĉielo, aŭ eventuale nur de la iomete nubigita. La kreskaĵon oni eltranĉas kaj tiel la okazintaĵo estis finita. Kun la infano la afero tamen nur komenciĝis...

Troviĝis multaj, multaj larmoj, kaj eĉ mia patro, kiu malsanis je pulmoj kaj estis proksime de sia tomo, sentis sin strange skuita, tamen li ne partoprenis vane kvar batalojn kaj tiel estis al kutimigita la malamikon rigardi rekte en ties okulojn. Li diris trankvilige:

»Mi ĉiam estis malfeliĉulo, sed dum certa tempo mi tamen ankoraŭ vivos kaj en la aĝo de sep jaroj la knabo povos esti akceptita en la kadeta lernejo.«

Li allistigis la nomojn de pluraj influaj oficiraj kamaradoj, kiuj la infanon estus pretaj subteni kaj li tuj renovigis kun ili kontakton, li ŝancelis, ĉu li pro mia estonta vivo volu por si alpreni la nobelan predikaton, von Waldisheim' kaj kontentigis sin kun tio, kio venos, kiel maljuna soldato kun perdita gambo.

Mia patrino, kontraŭe, ploris amare. En tiu alta aĝo la akuŝo estus danĝera kaj poste: ĉiuj, kiuj ĉagreniĝis pro tiu ĉi malfrua nupto, ne ignorus la eblecon primoki kaj skandaliĝi. Dum tiuj beataj antaŭmilitaj jaroj virino kun tridek jaroj validis kiel ‚passe‘ (pasinta, senperspektiva). Oni do povas imagi, kion faras du aldonaj jardekoj! Tiel mi jam antaŭ mia apero fariĝis miraklo, kaj la mirakloj estas kaj restas malŝatataj. Intertempe estis preparita ĉiele blua bapto kuseno por filo kaj nur la instruistinoj de la urba popollernejo por knabinoj – virinoj havas ofte nur etan emon ironii – donacis al mia patrino rozkoloran bapto kusenon.

En tiu ĉi mondo de lamentado oni neniam scias...

Elgermanigis Vinko Ošlak